Libreto por vortdiveni, libreto por desegni

recenzo de Leif Nordenstorm

Rim-Enigmoj, de Elena Popova, eld. Kava-Pech, Dobrichovice 2009

Rimversoj estas grava parto de la literaturo por 3-9-jaruloj. Ankaŭ en esperanto tiaj estas bezonataj por denaskaj esperantistoj kaj por infanoj studantaj esperanton. Aperis libreto *Rim-Enigmoj* de Elena Popova. Ĝi enhavas 34 versaĵojn, ĉiu kun ilustraĵo. La lasta vorto en ĉiu versaĵo ne estas skribita, tiel ke infano (aŭ plenkreskulo) devas diveni ĝin. Ni bezonas ekzemplon:



Ĉarmaj floroj
diverskoloraj,
staras kokete
kaj sekrete,
kvazaŭ ion promesas.
Mi jesas:
Matene la suno
trinkas per siaj lipoj
roserojn el la ……

La respondojn de ĉiuj enigmoj kaj tradukojn de la vorto al 12 eŭropaj lingvoj, oni trovas en la fino de la libro.

Leginte multajn porinfanajn librojn en esperanto por miaj kvin infanoj, mi kun bedaŭro konstatis ke la lingvaĵo en granda parto de ili ne estas infana, sed tro komplika, tiel ke la libroj estas nekompreneblaj por infanoj. Des pli ĝoja mi estis legante *Rim-Enigmoj*n. La lingvaĵo estas klara kaj simpla. Bildoj sur ĉiu paĝo helpas al la infano diveni la vorton. Poste li aŭ ŝi povas kolorigi la bildon. La libron oni povas legi kaj relegi multfoje. Ĝi uzeblas kaj por infanoj kaj por komencantoj.

Paron da duonrimoj oni povas toleri – *spektaklo*/*aglo*, *kampoj*/*heliantoj* – ĉar la ceteraj tridek du poemoj tute ĝuste rimas.

La ilustraĵoj estas bonkvalitaj kaj la kovrilo eĉ luksa.

Gratulon al Elena Popova por la bona verko, al Kava-Pech por la bona eldono kaj gratulon al Esperantio por la bona infana libro. ❀